



Esperanto-Informilo



Foto: U. Fellmann, la 24-an de februaro 2026, 19:05. Nia renkontiĝejo Statkafejo, kiu tiusemajne solenas sian 45-jaran ekziston.

Mesaĝo de la prezidanto:

Taĝo post tago la naturo revigliĝas kaj preparas sin post dormtempo. Ni jam planas libertempojn kaj feriojn, vojaĝojn en aŭ ekster Esperantujo. La nun kvarjara milito en orienta Eŭropo ĝis nun ne povis rompi nian kredon kaj esperon je la baza boneco de la homaro – kontraŭe, ĝi klare montras la unecon kaj stabilecon de eŭropa demokratia virtosistemo, kiu baziĝas sur individuaj rajtoj ene de sociale organizitaj socioj. La provo disrompi tiun kunttenon kaj solidarecon per „specialaj operacioj“ kaj malveraj faktoj kaj falsaj novaĵoj ne sukcesis, kaj la invadanta agresanto jam pagis ege altan sangoprezon por necertaj kaj malhonoraj gajnoj. Dio benu Ukrainion.

G. Hennemann, la 27-an de februaro 2026

Marto

2026

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:

Georg Hennemann

Ulrich Fellmann

Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann

Rehgartenstrasse 16

35683 Dillenburg

Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M

IBAN: BE92 9051 1007 7223

BIC: TRWIBEB1XXX

bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €

Familienmitglied: 48 €

Nur ESF: 24 €

Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo

La 3-an de marto 2026

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain>

Dua mardo

La 10-an de marto 2026

ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 17. März, 2026 --- Mardo, la 17-an de marto, 2026

19:00 h

Mitgliederversammlung

Membrokunveno

Kvara Mardo

la 24-an de marto

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“

Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,
[https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape Frankfurt 2021 Panorama.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg)

Anoncoj:

- 03.03.2026 19:00 Ni provas renkontiĝi per la jitsi-aplikaĵo
Ligilo: <https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain>
- 17.03.2026 19:00 Membrokunveno en la Saalbau MÜZ, Friedrich-Rompf salono,
vidu ankaŭ la anoncon en la lasta El.



elstaraj fotoj: “Esperantistoj dum kaj post la entombiĝo de D-ro W. Schwanzer”, de U. Fellmann
Rusujo limigas Telegramon - kaj prezentas dubindan alternativon “Max”

Eseo

de Georg Hennemann

Rusujo komence de februaro limigis aliron al la populara Telegram aplikaĵo, unu el la plej vaste uzataj mesaĝservoj en la lando. La registaro oficiale pravigas la agon kiel rimedon por "protekti rusajn civitanojn". Laŭ CNN, la rusa telekomunika reguliganto *Roskomnadzor* anoncis, ke ĝi limigos la funkciadon de la servo "ĝis kiam malobservoj de rusa juro estos korektitaj." La Telegram firmao estas akuzita pri sia malsukceso bloki enhavon klasifikitan de aŭtoritatoj kiel "krima kaj terorista." *Roskomnadzor* ankaŭ deklaris: "Personaj datumoj ne estas protektitaj, kaj ne ekzistas efikaj rimedoj kontraŭ fraŭdo aŭ la uzo de la mesaĝservo por krimaj kaj teroristaj celoj." Telegram neas ĉi tiujn akuzojn kaj emfazas, ke ĝi aktive kontraŭbatalas misuzon de sia platformo. Telefonaj alvokoj per Telegram estas jam delonge – laste ekde aŭgusto 2025 - blokita en Ruslando, kaj la mesaĝila servo estis ĵus limigita. Aliaj servoj kiel *WhatsApp* kaj *Signal* ankaŭ estas blokita en Rusio. Moskvo draste plifortigis la interretan cenzuron ekde la komenco de sia invado de Ukrainio antaŭ kvar jaroj. La mesaĝila aplikaĵo estas multe pli ol nur babileja aplikaĵo; ĝi ankaŭ servas la Kremlo kaj por-rusiajn militblogantojn kiel grava ilo por disvastigi propagandon. Sekve, la malpermeso estas polemika ene de Rusio kaj eĉ altiras kritikon de rusaj soldatoj. La komenco de la Telegram-limigoj koincidis kun la anonco, ke oni kompanse enkondukos "privatajn kanalojn" en la *MAX*-aplikaĵo. En la Telegram-kanalo *Baza*, kiu estas proksima al la ŝataj sekurecaj taĉmentoj, oni skribis, ke la 1-an de aprilo *Roskomnadzor* komencos "totalan blokadon" de Telegram, post kio Telegram estos alirebla nur

per VPN, kiel Instagram kaj Facebook. Ĉi tiu movo verŝajne celas deturni la uzantojn de Telegram al de registaro subtenata alternativo: *MAX*, ŝtate kontrolata "superaplikaĵo", modelita laŭ la ĉina *WeChat*, nun devas esti antaŭinstalita sur ĉiu saĝtelefono kaj tabulkomputilo vendita en Rusio. disvolvita de VK*, la aplikaĵo kombinas mesaĝadon, registarajn servojn kaj bankajn funkciojn. Fakuloj vidas en tio "grandegan gvatpotencialon". VK estas la plej granda socia reto de Rusio. Laŭ ĝiaj funkciigistoj, 100 milionoj da homoj uzas la servon. Kvankam tio estas nur frakcio de la 2 miliardoj da uzantoj de Facebook, ĝi tamen faras VK la plej populara retejo en Rusio. Ĉirkaŭ 69 procentoj de paĝvidoj en VK originas de Rusio. Ĉirkaŭ 8 procentoj venas el Ukrainio, 5 procentoj el Belorusio, kaj 3 procentoj el Kazaĥio. Germanio okupas la kvinan lokon kun 2,2 procentoj. Kompreneble, ĉi tiuj ciferoj ne estas kompareblaj al Facebook - la socia reto havas ĉirkaŭ 30 milionojn da uzantoj en Germanio - sed ili tamen estas rimarkindaj, ĉar VK ŝajne establis sin en Germanio, kvankam je relative malgranda skalo.

Kiel resumo oni povas konstati: La ŝtato de Rusio, aŭ pli ĝuste la Rusia Socialisma Federacia Soveta Respubliko kun siaj ankoraŭ kunligitaj respublikoj faras ĉion eblan por kontroli siajn civitanojn, same kiel la Komunista Partio de Ĉinio kontrolas kaj blokiĝas la aliron al eksterlandaj mesaĝservoj de siaj civitanoj en la Ĉina Popola Respubliko. La ĉinaj komunistoj regas kiel leninisma kadra partio. Sed apud tradiciaj metodoj, ili dependas de totala gvatado uzante ciferecajn sistemojn.

Ligiloj:

<https://www.morgenpost.de/politik/article411173545/russland-drosselt-telegram-und-positioniert-fragwuerdige-alternative.html>

<https://www.lesentiel.lu/de/story/neue-eskalationsstufe-russland-ermittelt-gegen-telegram-gruender-pawel-durow-103512914>

<https://www.apfeltalk.de/magazin/news/russland-blockiert-youtube-telegram-und-whatsapp-mit-dns-und-dpi-technik/>

<https://www.belltower.news/vk-die-russische-facebook-alternative-fuer-neonazis-verschwörungstheoretiker-und-internetthetzer-44704/>

<https://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/gegen-telegram-wie-der-kreml-seinen-messenger-max-staerken-will-110844367.html>

<https://www.zeit.de/politik/ausland/2018-05/kommunistische-partei-chinas-digitalisierung-ueberwachung>

Diversaĵoj

Ŝerco:

Domkolorigisto: „Kiel vi deziras min kolorigi tiun loĝĉambron?“

Edzino: „Mi deziras, ke ĉi tie plaĉu al mia edzo. Eble tiel, kiel estas kolorigite en la plej proksima drinkejo.“

Proverbo de la monato (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon kiu temas pri modereco - ne nur dum printempa tempo:

„Senlanigu, sed ne senfeligu“

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0773.htm

Enigmo

De Felmano Ulriko

Ĉu vi trovas la dek malsamecojn?



Wolfgang Schwanzer 5.6.1953 – 31.1.2026

Verŝajne ĉiu leganto de ĉi teksto jam scias: Wolfgang mortis la 31an de januaro. Kaj nur tuthazarde mi (Felmano Ulriko) sciigis pri tio – Anino skribis la 11an de februaro en nian Telegramgrupon:

„Mi ĵus aŭdis de mia patrino, ke Wolfgang Schwanzer mortis la 31an de Januaro pro pneŭmonio.“

kaj mi vidis tion 22 minutojn poste kaj demandis „Ĉu jam okazis entombigo?“

Kaj ŝi respondis „Okazos jam morgaŭ:“

Ŝi tuj kunsendis la mortoanoncon, kiu diris ke li mortis jam la 31an de januaro, subskribita de la familianoj, kaj la teksto informanta, ke la entombigo okazos jam la sekvan tagon.

Ĉar mi havis specialan rilaton al Volfango, pri kio vi sube povos iom legi – sen li mi verŝajne ne estus membro de ESF – kaj havis regulan kontakton al li pro mendo de libroj, mi tre ŝatintus iri al lia entombigo, sed, mi havis tri venonttagajn rendezuojn en mia laborejo, kaj malfacilus tiujn malanonci.

La anonco kaj sekva konversacio en la Telegramgrupo estis tiu:

Der Abschied von Dir fällt so schwer.
Traurig, aber auch in Dankbarkeit bewahren wir Dich in unseren Herzen.

Dr. Wolfgang Schwanzer
* 05.06.1953 † 31.01.2026

In Liebe nehmen wir Abschied:
Dr. Iris Leppert
Benno Schwanzer
Peter und Clara Schwanzer
Harald Schwanzer
alle Angehörigen und Freunde

Die Trauerfeier mit anschließender Beerdigung findet statt, am 12.02.2026, um 13:00 Uhr auf dem Friedhof in Ebersheim (Großgewann 9, 55129 Mainz-Ebersheim).
Statt Blumen bitten wir um Spenden an den Deutschen Esperanto-Bund (DE32 5085 1952 0040 1145 71), Stichwort: Dr. Wolfgang Schwanzer. ★
Traueranschrift:
Dr. Iris Leppert, c/o Bestattungsinstitut Schwenger, Postfach 10 01 07, 55132 Mainz

12:07

Ulrich Matthias
Ŝoka novaĵo. 😞 Li ĉeestis la decembran kunvenon en Frankfurto, kaj je la jarŝanĝo mi ankoraŭ gvidis kune kun li la komunan ekskurson de NR- kaj Lumineskanoj tra Majenco.

14:55

Li estis mia unua kontakto al la ESF, pro hazarda renkontiĝo en la Frankfurta Foirejo li informis min pri la ekzisto kaj renkontiĝotempo de la klubo, kies prezidanto li estis.

20:34 ✓✓

Morgaŭ mi tre verŝajne bedaŭrinde ne povos esti en Majenco pro tro multaj jam tempe antaŭfiksitaj aferoj.


20:41 ✓✓

Ĉu iu havas la telefonnumerojn de la familioj Rabenstein, Ullmann kaj Selten? Mi ŝatus telefoni al ili kaj informi ilin, se ili ankoraŭ ne scias.

21:02 ✓✓

Anina Stecay Admin
Reinhard certe devus havi la telefonnumerojn, kaj Georg same, ĉu ne?

21:40



Mi tiam ne sciis, ke neniuj aliaj de la Esperanto-Societo Frankfurto planis vojaĝi Majencen por partopreni kaj adiaŭi Wolfgangon, mi ja opiniis ke mi estas kvazaŭ la lasta kiu informiĝis. (Notu, ke Wolfgang iam estis la ESF-a prezidanto). Tamen mi ankaŭ ne aŭdis de iu ajn en la grupo ke ili planas vojaĝi al Majenco. Mi do tuj skribis mesaĝon al mia oficeja teamestro ĉu enordas kiam mi sekvatage pro entombigo malanoncos miajn planitajn renkontiĝojn, li tamen nur respondis venontmatene, mi ja sendis mian mesaĝon nokte kaj ripetis matene.

Matene ricevinte la jeson, mi tuj informis ĉiujn kolegojn ke mi devas forŝovi miajn televidkonferencojn kaj interparoladojn, kaj planis mian vojaĝon al Mainz-Ebersheim per publikaj trafikiloj. Tio ne estis tute triviala. La ceremonio en la kapelo eku je la 13a horo, pro necerteco de la trafikiloj mi devus plani aliri je la 12a horo (tio repagis! Mi ne estis eĉ minuto tro frue) kaj mi devis starti de mia loĝloko je 9:30, poste uzi kvon malsamajn trafikilojn (U2, S1, buso 54, tramo 53, buso 66). Planita alveno estis je 11:36 proksime de la indikita kirko.

Kiel atendite, ne ĉiu ŝanĝo de unu trafikilo al la sekva funkciis laŭplane, kaj kiam mi aliris la Majencan stacidomon mi jam estis tre malfrue. Je la Majenca stacidoma placo, kie mi ekuzo la tramon, ekzistis ses malsamaj lokoj kie tramoj haltis, kaj ĝis kiam mi trovis la ĝustan, unun mi jam maltrafis. Kiam mi alvenis proksime de la kirko estis jam 12:36, mi piediris kirken kaj trovis ĝin fermita. Neniuj homoj estis tie. Mi rigardis la malantaŭan tombejon, sed ne vidis ion. Vagante ĉirkaŭen iam venis tamen paro kiu ankaŭ serĉis la celebradon, kaj ili post dek minutoj konjektis, ke ni devus iri al la kapelo kiu situis je la plej malproksima punkto de la tombejo. Kiam ni alvenis, la diservo ĵus estis komenciĝinta, la kapelo estis plena de homoj kaj ni kun aliuloj devis stari ekstere, tamen povis vidi la pastron tra la glacomuro kaj aŭdi el eksteraj laŭparoliloj.



Jen kelkajn fotojn de tio kaj parte mesaĝojn, kiujn mi poste de mia saĝtelefono metis en nian ESF-an Telegramgrupon.

La fermita kirko kaj la homplena kapelo. La legado de la pastro prezentis la Pentekostan miraklon aludanta la temon interlingvo, poste la laboro de Volfgango por Esperanto menciigis, fine oni ludis ĉiujn strofojn de La Espero.



La parolado de la pastro estis tre kortuŝa, ankaŭ de lia amiko kiu suferis samtempe al Wolfgang je la sama malsano, sed resaniĝis. Wolfgang tamen falis en daŭre malpli bonan sanstaton kaj iam ne plu reagis kaj mortis.

Ĉi-paĝe kelkajn fotojn de la familianoj kaj la tombo.

Mi nombis ĉirkaŭ 120 - 150 partoprenantojn.



La adiaŭado antaŭ la tombo estis tre kortuŝa kaj longe daŭra, Iris kaj familianoj ofte parolis kun la salutintoj. Mi ĵetis al Wolfgang etan memoraĵon, kiun li antaŭnelonge estis doninta al mi.



La naŭ-minus-unu Esperantistoj. La sola ESF-ano operaciis la fotadon.

Tiam ni estis ankoraŭ sur la tombejo, sed survoje al la posta kaftrinka kunvenejo.



Mezbilde vi eble rekonas Iris.

Dum la kafumado, Wolfgang oftege temis



Sep de la espoj, kune sidantaj.



Mi enskribiĝis en la libro de partoprenantoj, kaj separate notis en ĝi Esperantosocieto Frankfurto, la vicprezidanto. Fine mi havis longan paroladon kun Iris kaj kun Martina Sachs, filino de Rüdiger Sachs.


Iris diris, ke ŝi provas daŭrigi la libroservon kaj post iom da tempo decidos, ĉu ŝi kapablas tion fari dum iom da tempo aŭ ne.

Pli pri Wolfgang – kaj la klubo

Kvin tagojn poste, Georgo matene skribis en la Telegramgrupon, ke li malvarmumis, do lia prelego ne okazos „hodiaŭ vespere“.

Mi rezervis du horojn por finpretigi prelegon, kiun mi jam estis planinta por alia kunveno, kaj je 17:30 skribis en la grupon:

„Informo: Mi hodiaŭ matene kaj tagmeze preparis prelegon por hodiaŭ vespere. Mi ne certas ĉu mi jam ĉeestos je 18.30, sed bv. komenci iu la lingvan rondon kaj informi la aliajn ĉeestontulojn, ke mi venos por prelegi. Mi supozas, ke estas por ĉiuj interesa temo.“



Mi alvenis je ĉ. 18:50, esperinte, ke iu farintus la lingvan rondon. Kiam mi venis, mi tamen estis sola. La MŪZ-gardisto diris, ke antaŭ mi ĉeestis viro kaj virino en la salono. Bedaŭrinde, mi ne povis eltrovi, kiuj estis, ĉu Rabenŝtejnoj, ĉu Ulmanoj, ĉu Seltenoj, ĉu iuj aliaj. Ili evidente deiris post iom da tempo ĉar neniu alia persono estis veninta.

Mi tamen iris en la kelon por preni librojn, flagon, ktp.

Kiam mi revenis en la salonon, ne estis iuj Esperantistoj en la salono,. Damne. Tio fiaskis.

Mi iom da tempo plu atendis, ĉar esperis, ke iuj membroj (re-)venos, sed neniu venis.

Pro mia soleca ĉeesto, mi do kaptis la ŝancon kaj en la kelo serĉis la vizitlibron de la klubo kiu kovris la tempon kiam mi venis al Frankfurto kaj estis la unuan fojon en la klubo.

Kaj mi trovis ĝin – eĉ kun fotoj de Wolfgang! Estis tiu

kiu kovras la ESF-kunvenojn ekde la 2a de januaro 1986 ĝis la kristnaska festo 2001.

Mi trovis, ke librokomence ne raris, ke pli ol 20 personoj kunvenis, kaj foje estis pli ol 30. Librofine estis plej ofte inter 15 kaj 20. Nuntempe venas kutime inter kvar kaj ok. Hodiaŭ eble okazis la unuan fojon, ke ekzakte unu persono venis.



Pli pri Wolfgang – kaj la klubo

Mi trovis la paĝon kiu dokumentas mian unuan ĉeeston en ESF, estis la 4a de oktobro en la jaro 1990.

(Foto supren)

Foto dekstren:

Je la antaŭa tago, mi vizitis la Frankfurтан librofoiron, kie mi trovis la standon de ESF, babilis kun Wolfgang Schwanzer (sur la foto maldekstre, apud li la juna s-ro Ullmann), kaj estis informita de li pri la kunvenoj de ESF. Jam la sekvan kunvenon mi estis en la Haus Dornbusch, kie nia Esperanto-Societo tiam kunvenis.



Kaj sufiĉe baldaŭ, mi estis parto de la estraro... (mi mem eĉ ne plu sciis tion):

Pauzo dum la estrarkunveno
je la 21.11.1992 ĉe familio
Rabenstein en Frankfurto



Dekstre-maldekstren:

S-ro Ullmann,
s-ino Stoessel 🏠,
s-ro Rabenstein,
s-ro Barnickel 🏠,
mi,
s-ino Rabenstein.

(Antaŭ 33 jaroj kaj 3 monatoj.)

Vikipedio & Enketilo

Mi ĉi tie daŭrigas mian temon pri revigligo de nia Esperanto-Societo.
Ĉi foje temas pri enketo, do demandaro, por kolekti la sciojn de la klubmebroj.

Tiu enketo havas du ĉeftemojn: Personojn kaj Vikipedion.

Mi kolektos informojn pri niaj eksaj mebroj por raporteti pri ili en nia veninta jarlibro, kaj petas ĉiujn de vi proponi, pri kiuj personoj ni raportu. Kelkajn sugestojn mi jam havas: Wolfgang Schwanzer, Wilhelm Barnickel, Rokuro Makabe, Reinhard Selten, Italo Chiussi, kma. Mi petas, sendu al mi retpoŝtaĵon aŭ skribu leteron kun proponoj!

Due, Vikipedio.

Mi jam delonge planis skribi Vikipedio-artikolon pri la Esperanto-Societo Frankfurto.

Ankaŭ estas aliaj ideoj, inkluzive de personoj (vidu maldekstren).

Kiujn artikolojn, krom personajn, vi opinias estis indaj?

Mi ekzemple pensis pri niaj Frankfurtaj ZEOj (Zamenhof- kaj Esperanto-rilataj objektoj, kiel stratoj, sed ankaŭ la du lokoj, en kiuj Zamenhof antaŭ pli ol 120 jaroj publike faris publikajn paroladojn.

Mi proponas kaj scias ion pri la jenaj iam ESF-rilataj personoj:

- 1 _____
- 2 _____
- 3 _____
- 4 _____
- 5 _____
- 6 _____
- 7 _____
- 8 _____

Mi proponas kaj scias ion pri la jenaj ESF-rilataj temoj aŭ ZEOj taŭgaj por Vikipedio:

- 1 _____
- 2 _____
- 3 _____
- 4 _____

Bonvolu sendi al ulrich.fellmann@gmx.de

aŭ al Ulrich Fellmann, Wilhelm-Flögel-Ring 51, 60435 Frankfurt am Main.

Aldonoj informoj por la membrokunveno

Anträge des ESF-Vorstandes (bis dato):

1.
Die MV am 17.3.26 möge beschließen: Anlässlich des 125 jährigen Bestehens der Esperanto- Gesellschaft Frankfurt, Gründungsdatum am 30.09.1904, bemüht sich der Vorstand den Esperanto-Weltkongress im Jahr 2029 nach Frankfurt am Main zu holen.

2.
Der D.E.B. beabsichtigt, die Mitgliedsbeiträge ab 2027 zu erhöhen. Wir beantragen, die kombinierten Mitgliedsbeiträge für D.E.B. + ESF so zu erhöhen, dass der Anteil für die ESF erhalten bleibt. Voraussichtlich bedeutet das für den vollen Beitrag:
bisher 96 € (D.E.B. 84€, ESF 12€), künftig 120€ (D.E.B. 108€, ESF 12€).
Familienbeitrag und ermäßigter Beitrag ändern sich entsprechend.

Wir bitten um ein zahlreiches und pünktliches Erscheinen.

Anträge bitte bis 3.3.26 schriftlich oder per Email an den Vorstand, Email: esf-estraro@listeo.eu